n° 203 MARTO 2000

# ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 GRAND-QUEVILLY Tel.02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## NORMANDAJ ESPERANTISTOJ KUNVENOS

## EN ROUEN DIMANĈON 2an DE APRILO 2000

***************************

Nia Bulteno estas la ĉefa interligilo de samideanoj loĝantaj en nia provinco. Pere de ĝi, la membroj de ESPERANTO-NORMANDIE estas informataj pri eventoj kaj aranĝoj organizitaj ĉie en la mondo. Pere de ĝi, ili estas informataj pri kongresoj, pri abonoj, pri la diversaj manieroj praktiki la lingvon kiun, iam, ili decidis eklerni.Kion opinias la legantoj de nia informilo ?: Riproĉojn, kritikojn, sugestojn ne sufiĉe ricevas ties redaktanto. Pro tio, la bultenisto bezonas renkonti la legantaron. La Ĝenerala kunveno estos necesega okazo renkontiĝi por interdiskuti.

Nia asocio havas aliajn celojn : disvastigi esperanton , informi homojn pri ties ekzisto, rilati kun aliaj asocioj kaj partioj (niaj klopodoj okaze de elekto por eŭropa parlamento) organizi rondvojaĝojn en nia provinco por esperantistaj eksterlandanoj. La ĵus okazinta vojaĝo de Amanda, juna Kalifornianino estas ekzemplo de efika agado. Ŝi vizitis Dieppe, Fécamp, Le Havre, Rouen kaj Hérouville. Ŝi prelegis en 3 urboj atestante utilecon de Esperanto , eĉ por personoj kies gepatra lingvo estas la angla ! Aliajn vizitantojn intencas inviti nia unuiĝo .
La junuloj kiuj aktivas en nia movado havas novajn ideojn kaj ni devas ilin subteni por organizado .Ili organizos en Septembro 2000 (de la 22a ĝis la 24a) gastronomian semajnfinon rilate al "pomo" Partoprenos la Poman Semajnfinon en Pays d'Auge multaj gejunuloj , membroj de JEFO ; ili venos el tuta Francio kaj sendube venos ankaŭ eksterlandanoj. La Ĝenerala kunveno estos ankaŭ necesa por interŝanĝi ideojn pri tiuj projektoj.

Nia asocio estas demokrata: tio signifas ke ĉiuj membroj rajtas aprobi aŭ malaprobi la raportojn kiujn la estraro prezentos al vi. La membroj rajtos ankaŭ kontroli ĉu mono sendita por pagi kotizojn kaj abonojn estis bone kaj honeste uzita.

La estraro de Esperanto-Normandie ne konsistas el dumvivaj membroj. La statutoj de nia movado postulas renovigon de estraro. Okaze de la Ĝenerala Kunveno, ĉeestantoj voĉdonos por novaj komitatanoj.
Ni do invitas kandidatojn sendi al Prezidento de U.N.E.:
*Sro Yves NICOLAS*
*17 /37 quartier du Bois 14200 Hérouville Saint Clair*
sian kandidatecon:"Mi estas kandidato por fariĝi membro de estraro de Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj"
Ekskomitatanoj ankaŭ devas konfirmi sian rekandidatiĝon.
Jen do multaj motivoj por ĉeesti la Ĝeneralan Kunvenon . Ni nepre atendas vian partoprenon

Petro KIJO

## REUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION

Le Conseil d'Administration de ESPERANTO-NORMANDIE se réunira le Dimanche 2 Avril entre 10 h et 12h dans le Bureau n° 4 du 2ème étage de la Halle aux Toiles, Place de la Basse Vieille Tour à Rouen (Rive droite)

Sont conviés les membres de la "estraro", les responsables de groupes et toutes les personnes désirant jouer un rôle actif dans notre association

A l'ordre du jour: la réunion de l'après-midi

***************************************************************************

## ASSEMBLEE GENERALE DE "ESPERANTO-NORMANDIE"

**Assemblée Générale de l'Union des Espérantistes de Normandie:**
Cette Assemblée Générale statutaire se tiendra
**Dimanche 2 Avril 2000 à 14 heures**

**Halle aux Toiles, Place de la Basse Vieille Tour, Rouen**
**Salle N° 2, deuxième étage**

Tous les espérantistes de Normandie doivent y participer. Nous comptons sur votre présence. Réservez cette date dès maintenant sur votre agenda

ORDRE DU JOUR:

- Rapport moral
- Bulletin Normand
- Rapport Financier
- Actions à engager
- Renouvellement du Conseil d'Administration
- Résolutions et questions diverses

**Fédération Normande de France-Esperanto (U.F.E.)**
Cette réunion des adhérents d'UFE traitera des relations entre la Fédération Normande et l'association nationale Union Française pour l'Esperanto. Cette réunion nous fournira des informations sur le mouvement espérantiste national et international, sur les congrès d'UFE et d'UEA. Tous pourront y participer mais seuleument les adhérents d'U.F.E. pourront prendre d'éventuelles décisions.

*Nous rappelons que les 2 structures ont le même Conseil d'Administration.*

***************************************************************************

**Conférence par un visiteur étranger:**
Nous envisageons la venue d'un "eksterlandano" qui pourrait clore agréablement notre réunion

**DERNIERE MINUTE:** ***Nous attendons la visite de gesinjoroj SHEN. qui nous*** *parleront* du **TAOISME en Chine**

***************************************************************************

**CONSEILS PRATIQUES** pour venir à Rouen le dimanche 2 Avril

**PARKING;** Il est facile de garer sa voiture gratuitement le dimanche sur les quais de la rive droite ou la garer dans le parking payant de la place de la Haute Vieille Tour

**REPAS:** Nous pourrons manger ensemble au restaurant libre service FLUNCH 60 rue des Carmes

**Rendez vous entre 12h 15 et 12h 30** devant la porte du restaurant. Pour que nous mangions à la même table, **veuillez téléphoner à Pierre Quillaud Tél. 02 35 69 66 09.** Je réserverai une ou 2 tables dans la partie "Non-Fumeurs" du restaurant Flunch mais il est nécessaire de savoir combien nous serons. Bien entendu, chacun mangera en fonction de ses goûts

# FINANCAJ RAPORTOJ 1999

Union des Espérantistes de Normandie (CCP 283 40 H)

| RECETTES | | | DEPENSES | |
|---|---|---|---|---|
| **Au CCP le 31/12/98** | | **7563,94** | | |
| Cotisations | 4320,00 | | Bulletins 199 à 202 | 3976,30 |
| Dons | 1600,00 | | Frais administratifs | 184,30 |
| | | | Elections Européennes | 480,15 |
| | | | Conférence Hagège | 251,00 |
| | | | Subvention GEA | 200,00 |
| | | | Soutien Grésillon | 700,00 |
| | | | Réception Cheminots | 467,00 |
| | | | Fleurs inhumation | 80,00 |
| Total Recettes | | 5920,00 | Total des dépenses | 6338,75 |
| | | | **Au CCP le 31/12/99** | **7145,19** |
| | | 13483,94 | | 13483,94 |

**********************************************************************

Fédération Normande d'U.F.E. (CCP 2348 06 C)

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **Au CCP le 31/12/98** | | **4172,72** | | |
| Ristournes sur cotisations | | 674,00 | Frais administratifs | 89,00 |
| | | | Soutien à Grésillon | 500,00 |
| | | | Déplacements à UFE | 308;00 |
| | | | Total des dépenses | 897,00 |
| | | | **Au CCP le 31/12/99** | **3949,72** |
| | | 4846;72 | | 4846,72 |

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**Alvoko de la kasisto:**

Mi jam ricevis kelkajn abonkotizojn por la jaro 2000
Bonvolu tuj sendi vian kotizon al Union des Espérantistes de Normandie CCP 283 40 H
Tio faciligos nian laboron
La normala kotizo estas 50 F

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**ABONU: "LA MIGRANTO"**

Trimonata ligilo de la esperantistaj Naturamikoj, eldonita de Turista Asocio : La Naturamikoj-Esperanto-fako (TANEF)
Jara abono : 55 FRF
Pago al Aurore CASANOVA, 25 rue de Bourgogne 94440 Villecresnes
Ĉeko je la nomo de ESPERANTO MIGRANTO CCP 2076 05 N Paris

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

**KULTURA ESPERANTO DOMO:** Ni estu optimismaj pri estonto de Grezijono



Multaj interesaj staĝoj estas organizitaj por Somero 2000.Krom la diversnivelaj kursoj, estos: kantado, piedmigrado, teatro, jogo, aranĝoj pri Esperanto kaj Amnesty international, renkonto kun lokaj ekologoj ktp...
Petu programon al Pierre Quillaud

## NIA VIVO EN :

**DIEPPE:** Du aktivaj junulinoj alvenis preskaŭ samtempe en Diepa regiono. Ili estas membroj de JEFO kaj UEA kaj ili akceptis la junan Kalifornianinon Amanda kiu rondvojaĝas tra Eŭropo dank'al "pasporta servo". Ni deziras al Dominique kaj al Christine bonan sukceson por krei esp.grupon en Dieppe.

**FECAMP :** Mouloud Touileb reagis al artikolo aperinta en "Le Monde", artikolo de Claude Didry titolita" Social, la fin du mouvement national". En la artikolo, oni legas:*"Face aux accords sur le commerce mondial, il n'y a pas d'autre solution , pour préserver des acquis sociaux séculaires, que de revenir à l'un des piliers du mouvement ouvrier: l'internationalisme.*

*Reste la barrière des langues"*. Mouloud konsilis al Claude Didry la legadon de la libroj : "Le défi des langues" et "L'homme qui a défié Babel"

**LE HAVRE:** Amanda restis 2 tagojn en Le Havre. Ŝi prelegis pri sia vojaĝo

**GRAND QUEVILLY / ROUEN** : Okaze de la vizito de Amanda, la grupo organizis publikan kunvenon. Ĉeestis 20 personoj; kelkaj estis neesperantistoj aŭ komencantoj; tio necesigis franclingvan tradukon. Interesa kaj grava artikolo kun foto aperis en la ĵurnalo "Paris-Normandie".

Janine Dufossé prelegos pri la libro "Le défi des langues" dum kunveno de asocio "Union Rationaliste"

**NOTRE DAME DE BONDEVILLE(76):** Okaze de salono de "Globe-Trotters", ni starigis budon kaj deĵoris dum 2 tagoj. Pluraj centoj da vizitantoj interesiĝis pri nia budo kaj petis informojn.Ni montris la libron de ge- Robineau "Et leur vie, c'est la terre - 8 ans de nomadisme autour du monde" kaj ni disdonis kolorajn informilojn pri Esperanto eldonitajn de JEFO.

**HEROUVILLE SAINT CLAIR / CAEN** : Malmulte da personoj ĉeestis la prelegon de Amanda ĉar pro striko de ĵurnalistoj en Ouest-France, la kunveno ne estis anoncita.Tamen, Si estis poste intervjuita. Amanda partoprenis la kurson kaj afable babilis kun ĉiuj lernantoj.

**FLERS (61):** Anne-Marie Leprévost aktivas en departemento"Orne" Ŝi kontaktas politikestrojn okaze de kampanjoj favoraj al Esperanto.

**MANCHE:** vidu apartan paĝon de nia bulteno

*************************************************************************

## PARTOPRENU KONGRESOJN DUM JARO 2000

+++++++++++++++++++++++++++

En la decembra bulteno, ni jam informis vin pri kongreso de SAT-Amikaro en Fouquières-lez-Lens de la 22a ĝis 25a de Aprilo (Pasko), pri kongreso de SAT en Moskvo de la 15a ĝis la 23a de Julio kaj pri Universala Kongreso en Tel Aviv de la 25a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto.

Jen aliaj manifestacioj kie vi povos agrable praktiki Esperanton

**UNUA AKTIVULA SEMAJNFINO DE UFE** (kun membrokunveno) okazos en la urbo BOULOURIS (apud St Raphael) dum Ĉieliro (Ascension) de la 1a ĝis la 4a de Junio 2000. Venu, venigu aktivulojn kaj grupestrojn. Tie ni kunvenos por labori en grupoj laŭ fako, laŭ gusto...Aliĝilo troviĝas en la decembra numero de Franca Esperantisto aŭ ĉe UFE

**KULTURA ARTA FESTIVALO DE ESPERANTO:** okazos en la urbo Toulouse de la 5a ĝis la 9a de Julio. KAFE daŭros 5 tagojn kun po 2 aŭ 3 spektakloj vespere kaj diversaj programoj posttagmeze ( pupteatro, kanzonoj, forumoj, ĥorkanta staĝo, ktp). La programo entenos la plej multajn nuntempajn esperanto-artajn grupojn ĉiustilajn el tre diversaj landoj: rokmuziko, varieteo, teatro, kanzono. Petu aliĝilon kaj informilon pri loĝado, manĝoj... al :KAFE / Esperanto Kulturcentro 1 rue Jean Aillet 31000 Toulouse Tél. 05 61 81 95 65

**KVARA EŬROP-UNIA ESPERANTO KONGRESO** de la 27a de Aprilo ĝis la 1a de Majo(semajno post Pasko) en **OOSTENDE (Belgio)**. Jen kelkaj programeroj : Kolokvo en Eŭropa Parlamento kun Eŭrodeputitoj.Tagmanĝo en Eŭropa Parlamento. Prelegoj. Vizito al ekologia centro de Oostende kaj al la Provinca Bieno Raversijde. Bankedo. Marveturo al Nieuwpoort per la ŝipo Sea-Star; prelegoj pri Norda Maro (sur la ŝipo); muziko kaj danco. Ebleco de vizito al Bruĝo

Tiu kongreso estos tre interesa kaj Belgio ne estas tre malproksima de Normandio

Petu programon kaj aliĝilon al Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

# PLILONGIGO DE TENDENCOJ

## (sciencfikcia noveleto)

Okazis dum bela posttagmezo de julio 2.203. Spite siaj 104 jaroj, Sebastiano R. estis irinta al la stadiono Malherbe en Caen. Sekvinte longan familian tradicion, li estis estinta bona sportulo dum sia tuta utila vivo; krome li ĉiam estis evitinta alkoholozajn trinkaĵojn, tabakon, narkojn, kaj troan manĝadon; tiel li daŭre ĝuis bonan sanon kaj vivamon. Pro tio, li interesiĝis pri la escepta tiutage okazonta konkurado: centmetra libera marŝado !

Jam de 40 jaroj, nenia organizanto estis kuraĝinta en Eŭrofrankio, alfronti la moralajn kaj jurajn riskojn de tia spektaklo. La Ligo por la homa Respekto, la Asocio de Georfoj de sportuloj, la Ligo por la Sano, la Klubo de Egaluloj, la Asocio kontraŭ Sufero kaj Laceco, la Asocio Kontraŭ la Sportista Ekshibiciemo kaj Stulteco, kaj multaj aliaj, apogitaj de preskaŭ ĉiuj partioj, estis de longe sukcesintaj malpermesigi la plejparton de la sportoj. Interalie ne plu eblis praktiki alpinismon (50 mortigitoj jare), skion (40 mortigitoj), taŭrfrontadoj (2.501 mortigitoj jare, el kiuj unu homo kaj 2.500 taŭroj), ĉasadon (centmiloj da mortigitoj el kiuj 20 homoj), piedan ekskursadon, enmaran kaj enriveran banadon, paraŝutismon, rajdadon, glisflugadon, kaj pli ĝenerale ĉiujn laŭdirajn sportojn kiuj povis esti riskaj por la vivo, homa interalie. La argumentoj de la prohibicianoj estis fortaj: ĉiujare en la nura Eŭrofrankio oni bedaŭris tri "homajn hekatombojn" se mi kuraĝas uzi kune tiujn principe neakordigeblajn adjektivon kaj nomon, ne parolante pri la taŭroj, senigitaj de la dirita nomo. Sed estis aliaj kialoj, ankaŭ pezaj: la humanistaj asocioj substrekis ke la deziro venki kondukis al dopado kaj friponado; ke la ekzisto de venkintoj, de venkitoj kaj de eĉ ne selekteblulој, estis faktoro de orgojlo ĉe la unuaj, kaj de frustracio kaj morala sufero ĉe la aliaj; ke la supertrejniĝo okazigis antaŭtempaj forpasoj; ke la dikmonaĉo, netolerebla sur tiu noblaspira kampo, sur ĝi tamen mastre regis, tra reklamado, elsendorajtoj, subpagoj al la sportistoj, ktp ... Plie, la sportaj manifestadoj deturnis la popolmasojn de pensado, eronprenis el ilia libera tempo: ĉe la finiĝanta 20-a jarcento, antaŭ la fina surtronigo de la Makdodemokratio, la registoj ja povis toleri, kaj eĉ deziri, ke la popolmasoj pli interesiĝu pri sporto ol pri la administrado de la publikaj aferoj. Sed tiam, en 2.203, la sinsekvo de la etaj kvantaj ŝanĝoj estis okazigínta la kvalitan ŝanĝon. Tiutempe, la popolo povis kaj devis konstante aŭdi ke li vivis en la Plej Bona el la Mondoj; la amasinformiloj kiuj de tiu Mondo proklamis la meritojn kaj ĝojojn, ne devis esti konkurencitaj rilate la publika atento, de tiom mokindaj kiom danĝeraj sportaj manifestadoj.

Do Sebastiano R. kiel ĉiuj spektantoj, estis venigita sialoken en la sidŝtupoj per rultapiŝo por rulseĝoj. Ĉirkaŭ li troviĝis la fizika elito de la Socio, tiuj kiuj kuraĝis eldomiĝi: dikventraj obezuloj, pufvangozuloj, pezpugaj gluteozuloj, kakesiuloj, ĝibuloj, lambastonuloj, diabetuloj, dializuloj, transpontaditoj, splenektomiitoj, karmenizuloj, paluloj, citronflavuloj, ... Ĉiuj esprimis sian entuziasmon pri la nekredebla evento baldaŭ okazonta sub iliaj okuloj.

Kiam megafono anoncis la komencon de la provo, la tusadoj, raŭkadoj, gorĝoskrapadoj kaj plej diversspecaj borborigmoj, iom kvietiĝis. Tiam oni vidis dek kvar gesportuloj antaŭeniri sur la stadionon, lantapaŝe ja, sed despli majeste. Ili estis lasintaj siajn sieĝveturiletojn en la vestejoj kaj fiere marŝis sen kiu ajn paŝhelpilo, (franç. "déambulateur", angl. "zimmer"), bastono aŭ korseto. Tio aldonis al iliaj baldaŭaj grandfaroj !

La nura fakto ke ili havu la fieran volon marŝi, kapalte, proprarimede, malgraŭ la severa elprovo kiu atendis ilin, transfiguris la multegon kaj kaŭzis ovacion, tamen obtuzan kaj singardeman; sed kelkaj ekcititoj iris ĝis strariĝi !

La atletoj, rektegaj, belegaj, alliniiĝis ĉe la startlinio. Temis pri sep virinoj kaj sep viroj, laŭ la postuloj ekde 1999 de la Konstitucio de Eŭrofrankio, pri ĉiukampa kvanta seksegaleco. La binokloj fokusigitaj al ili ebligis sonĝi, sub iliaj malplenetaj survestoj, pri la nekredeble muskolaj femuroj kaj suroj, pli la ĝibetozaj duraj ventroj, mirindaj ŝultroj kaj deltoidoj, foje duonviditaj en malnovaj revuoj nun pli malpli malpermesitaj.

Kaj estis la ekstarto !

La konkursanto Numero 8 trombe ekiris kaj tuj estis la unua. Je la kvina sekundo li jam estis sep metroj antaŭ la dua, la numero 14, kiu mem jam estis je 4 metroj de la startlinio. Gigantaj ekranoj sciigis ke la unua antaŭeniris je 2,2 metroj/sekunde, kio estis fantasta. La aliaj sin ŝparis; ili ĉiuj estis preskaŭ surliniitaj je 2,5 metroj de la forirejo: ili sciis ke sporta konkurado ne estas gajnita nur per muskoloj, sed ankaŭ postulas inteligenton. Ilia meznombra rapido, 0,5 m/sek. ja ne estis komparinda kun tiu de la numero 8, sed en absoluto, ĝi jam estis rimarkinda; estas ĉe alveno kiam oni juĝas la kurantoj.

Jam ĉe la deka sekundo, iuj signoj vidigis ke la eŭforio kaj esperoj de la komenco ne plu validis: la numero 14 haltiĝis, dumane premante sian maldekstran flankon. Tuj, konforme je la regularo, magneta senpeza takiŝvebileto supervenis kaj lin forprenis de la areno.

La numeroj 2 kaj 5 estis grave malakcelintaj; ili kuraĝe sed kline kaj pezapaŝe koksumadis al la celo; verŝajne ili ne plu irus malproksimen. La numero 8 daŭre estis la unua, sed ankaŭ li estis malakcelinta. La ĉefaĵo de la partoprenantoj daŭrigis sian inteligente dozitan klopodon.

Subite, je la 45-a sekundo, kiam la ĉefaĵo je 50 metroj de la alvenlinio postkalkanumis la numeron 8, la konkursantino N-o 11 ekfunkciigis la neŭronojn: ŝi akcelis kaj transpasis de ŝia antaŭa meznombra 1,1 m/sek., al 2,00 m/sek. En la ĉeestantaro estis deliro, mezurita, ĉar tusado kaj anhelado estis rekomencintaj; oni admiris ke homoj kapablu plenumi tiajn performancojn pere de siaj nuraj naturaj rimedoj. Plie, la numero 9 sekvis la gazelon en sia forflugo, sed ja atentis ne ŝin preterpasi, ĉar li taktike projektis tion fari lastamomente. Fakte, la junulino kolapsis je 20 metroj de la alveno, kaj siavice estis forprenita de takiŝvebilo.

Oni jam marŝis de unu minuto. La numero 9 daŭrigis sian nekredeblan klopodon, postlasinta la sekvantaron pli ol dek metroj malantaŭ. Certa pri siaj rezervoj kaj pri la venko, por la gestobeleco, li eĉ permesis al siaj piedoj ambaŭ samtempe forlasi la grundon, tiel realigante dekon da kurpaŝoj sub la okuloj de la mirigita spektantaro. "Quo non ascendet homo ?" (kien homo ne ascendos ?). Sed li resaĝiĝis kaj viglapaŝe, venkinteske, transiris la alvenlinion post nur 70 sekundoj da klopodoj.

Sebastiano R. admiris, estis deviga, kvankam li havis la intiman pretendon sin kredi kapablan, li, pli ol centjarulo, fari almenaŭ same. Sed riveli ke li piede, ĉiutage, dekfoje rondiris sian ĝardenon de Mathieu, estus estinta malsaĝa. Lia avo, kies voknomo li estis ricevinta, ĉirkaŭ 2.019 kuris la 1.000-metron je tri minutoj du dek sekundoj, kiel lia avo en 1947.

HENRI ROUSSEAU en Mathieu (14)

| | I | II | III | IV | V | VI | VII | VIII |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | a | n | t | a | u | ■ | a | r |
| 2 | f | ■ | e | m | a | j | ■ | e |
| 3 | i | ■ | l | o | t | a | d | o |
| 4 | k | i | e | ■ | o | r | u | s |
| 5 | s | ■ | f | i | ■ | d | o | t |
| 6 | o | n | o | ■ | | o | n | a |
| 7 | ■ | e | n | e | ■ | n | o | t |
| 8 | v | i | o | l | a | ■ | n | o |

*Vertikala*

*I - ĝi povas esti antaŭ aŭ post la radikoj- II - ne konfesi. III - ĝi povas esti portebla. IV - dolĉa sento. prefikso de eliro. V - Unuo de elektra potenco. VI - angla longounuo (ak). VII - Kiam ili estas du, tio faras unu(ak). VIII - variigebla rezistilo.*

*Horizontala*

*1 - La malo de post.- sufikso de kolekto (s.f.) 2 - rilato al la emo 3 - oni povas perdi aŭ gajni. 4 - pronomo de loko. - beligi (kondit.). 5 - greklitero. - donaco de la edzino (s.f). 6 - frakcio. - agrabla. 7 - interne - muzikero(sf). 8 - episkopa koloro.- "ne" de la angloj*

## Esperanto 50

Pro diversaj malfacilaĵoj, la prelego de Usona amikino ne okazis en Saint LO, ni esperas venontan fojon, akcepti aliaj vizitantojn.

Andreo

## *Ĉu mi povas opinii?*

*La plej stulta sinteno de Ministro de Nacia Edukado, konsistas nescii iajn problemojn, nome pri la posedo de la eksterlandaj lingvoj. Se vere estas, la fakto konstati la pluralecon, kiu ekzistas Francion, - kvardek lingvoj, skribis li - endas ankaŭ diri, kiuj estas la procentoj de sukceso de ĉiu el ili. Ni sendube vidos, kiuj lingvoj estas konsilitaj malgraŭ la tre malbonaj rezultatoj, ĉar tro kompleksa. Kompreneble, mi volas nur paroli pri lingvo, kiu ne havas favoron de niaj altaj instancoj, "Esperanto". Do, eta teksto ĉi sube, por montri kiom la lingvo estas interesa, ĉar tre proksime de Franca.*



*Esperanto estas ne aĉa lingvo por la babilado de infanoj aŭ oldaj personoj, sed vera lingvaĵo agnostita de la Internacia Akademio ĉe Usona 1888., kiel vivanta lingvo. Tiun internacian lingvon "Neŭtra" disponas la civitanoj de homaro*

*- Tio ne estas bopatrinaj diroj, ĉu ne avĉjo -*

*La disaj diplomoj, kompreneble, taksas la neefikecon de la instrurimedoj. La grandega mizero de la rezultoj ĉe lernejoj, ekaperas Francion, pro la emo kiun havas la lernantoj kredi la diroj de la Ministrado - lernu tia - Kial tia? - Endas unue scii la veran studocelon (studi aŭ uzi la lingvon,). studi: iu ajn taŭgas se oni ne nombras la horojn - sed por uzi ĝin, oni devas elekti tiun, kiun pli facile kaj rapide lerniĝas. Se oni deziras akiri kelkajn erojn de iu lingvo, oni povas estri mem siajn studetojn. Ĉiuj gepatroj devas priatenti siajn idojn, lernigi praktikan lingvon, loĝika do facila. Esperanto iĝus tia instruilo, kiu ebligas la lernadon, tiom bone al knaboj kiom knabinoj, eĉ la plej junaj. Indas vidi, kiel bone parolas tre junaj infanoj dekjaraĝaj, ĝia kapo estas kiel plumingo, sed en kiu, oni nepre metas la dulingvismon. Tiu vidpunkto ne ankoraŭ atingis la plimulton de la instruistoj. La malfacilaĵoj estas tre ofte la miskomprenoj de prononcado, pro la neregulaj konstruoj de la vortoj, tio kio ne okazas pere de Esperanto.*

*Lerni eksterlandan lingvon nacian postulas almenaŭ okoble pli da tempo ol la internacia lingvo. Pli ol trikvaronoj de la kandidatoj sukcesas la ekzamenprovojn. En niaj lernejoj, ne sufiĉas studi unu- aŭ duope (ĉe lingvlaboratorio) aŭ po ok lernantoj kurse, la rekonsidero de tiuj problemoj devus interesi nian Ministraron. (jes, nia .... ĉar mi bone konas la domon!)*

*Ankaŭ pri aliaj francujaj problemoj oni devus klopodi, pri la enhavo de la libroj. Niaj posteuloj eble estos plibonaj selektantoj. Cerbumi serioze, estas laboro de la politikuloj.*

*Kiel lingvo nedeviga, Esperanto Francie certe sukcesos, sed kiel kutime, ĝi estos lasta lando kompreni tiun problemon.*

Vortaro

Por kontakti nin RETE Klubo :

Esperanto_50@libertysurf.fr
Pdt : F5am50@yahoo.fr

